

Novajoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

EL NIA MUZEO

En nia Esperanto-Muzeo, esperantaj gazetoj japanaj kaj alilandaj estas elmontritaj en gazeto-rako (foto). Jen estas tabelo de alilandaj gazetoj.

nomo de gazeto/bulteno	plej nova n-ro	eldonanta E-organizo	lando
La Lanterno Azia	2024 maj/jun	Korea Esperanto-Asocio (KEA)	Koreio
juna amiko	2023 nov.	Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)	Slovakio
Esperanto	2024 jul/aŭg	Universala Esperanto-Asocio (UEA)	Nederlando
Starto	2023 n-ro 3	Ĉeĥa Esperanto-Asocio	Ĉeĥio
Esperanto aktuell	2024 n-ro 3	Germana Esperanto-Asocio (celas Esperanto-amikojn en Germanio kaj Aŭstrio)	Germanio
Harca Esperanto-Kuriero	2024 n-ro 1	Interkultura Centro Herzberg	Germanio

eĥo el Francio

(Venis jena letero al s-ro Mizro Iwaya, de la franca urbo Liono.)

Dankon pro ĉi tiu bela eldono.

La konsilo meti la paperojn kaj vestaĵojn sub la sunon estas bonega ideo.

La artikolo pri Lingvo Stilo Formo estas tre interesa.

Gratulojn al la artistoj (penetraĵo kaj kantado de Noo). La spirito de Japanio vibras en tiuj artoj.

Amike, Sinjoro Marc-Olivier GRAZIANI

Aŭstralia Radio 3ZZZ legis niajn artikolojn

(maj-jul. 2024)

elsendo de la 13a de majo 2024

el Novajoj Tamtamas numero 396

- 1) "Sezonas festoj en nia lando" de Itabaŝi Micuko .
- 2) "2000-enaj monbiletoj el Germanio" de Namba Fumiharu.

elsendo de la 17a de junio 2024

el Novajoj Tamtamas numero 397

"Malfruaj sakuroj" de Mizro Iwaya



gzeto-rako en nia Muzeo

eseo

Onomatopeo

Itabaŝi Micuko

Lastatempe mi provizore finis mian taskon, kiu estis esperantigi porinfanan rakonton, kaj kiun mi mem ŝarĝis al mi.

Mi partoprenis en bergena kongreso en 1991. Tiam mi hazarde promenis kun k-ino Sato Jasuko en nacia parko de Bergen. Tie estis multaj padoj, kaj vagadante ni rakontis multajn niajn aferojn. Kiam mi rakontis pri mi, mi parolis ankaŭ jenajn aferojn: Mi tre ŝatas porinfanan literaturon kaj legis multe da rakontoj skribitaj de japanaj aŭtoroj kaj tradukitaj en japanan lingvon. Mi pensas, ke infana rakonto spegulas la vivon kaj la penson de la nacio, al kiu ĝi apartenas. Tial ĝi estas tre utila por interkompreno.

Kiam mi legis bonegajn rakontojn de nia lando, mi foje pensis, kiom da rakontoj el ili estis prezentitaj por eksterlandanoj. Se ni povos prezenti tiujn rakontojn pere de Esperanto, ni povos samtempe prezenti tiujn al personoj, kiuj vivas en multaj landoj. Mi volas progresi en nia lingvo por esperantigi miajn ŝatatajn porinfanajn rakontojn, kaj menciis kelkajn librojn.

En tiuj libroj estis verkitaj de Inui Tomiko. K-ino Jasuko diris, ke ŝi estas intima amikino de Inui. Infanaĝe ili estis bubinoj kaj bande kunludis en kampo. Danke al ŝi mi povis havi kontakton kun s-ino Inui. Kaj ŝi diris: "Elektu tiom da rakontoj, kiom vi volas.". Mi elektis du rakontojn, kiuj estis "*Kokage no ie no kobitotaĉi*" kaj "*Kurajami no tani no kobitotaĉi*".

Esperantigi japanan lingvon estis tre malfacile, precipe onomatopeojn. Iam mi skribis mian ĉagrenon en mia blogo de japanlingvo, tiam blogoamikino loĝonta en Francio, kiu tre amas korean rokbandon, komentis, ke japanoj uzas 4500 onomatopeojn, sed koreoj uzas pli

multe ol ni, pli-malpli 5700 onomatopeojn. Mi miris, kiel ni povos esperantigi tiom da vortoj.

Mi estas ne lingvisto, tial ne povas klarigi, kial nia lingvo tenas tiom da onomatopeoj. Nur, laŭ mia opinio, la japana ne havas fortan akcenton kaj ritmon, tial ni donas viglecon kaj ritmon per la onomatopeoj. Mi volas transdoni japaneskan senton de rakonto kun onomatopeoj al japanaj rakontoj.

Onomatopeo estis skribita en "Plena analiza gramatiko de Esperanto" jene: Al interjekcioj oni povas almeti la onomatopeojn..... Ofte Z., por krei onomatopeojn, uzas la radikojn, aŭ la unua silabon de la koncerna vorto.....

"*Kokage no ie no kobitotaĉi*" estis eldonita en 2017. La esperanta titolo estas "La nanoj en domo kun granda Zelkovo". Por eldono multaj personoj helpis min. Mi elkore dankas ĉiun, precipe al samideano Nagai Acuko. Ŝi ilustris paĝojn Klarigoj. Ŝi bone montris scenojn de la historio kaj la naturo en nia lando.

De tiam pasis sep jaroj. Mi provizore finis esperantigi la rakonton "*Kurajami no tani no kobitotaĉi*". La esperanta titolo estas "La nanoj en Mallumvalo" Mi enmetis ĝin en mia esperantoblogon por konservi.

Ambaŭ rakontoj koncernas la pacon. Kiam mi estis infano, nia ŝtato ĵuris jam ne okazigi militon. Tiam mi infana pensis, ĉu ne militi estas ne batali? Kion ni devos agi, kiam ni estos atakota/atakata? Kiel ni devas agi por la paco? En tiuj pensoj la rakontoj interesis min.

Lastatempe mi ne havis tempon por legi novan rakonton. Ĉu iu tenas interesajn rakontojn? Mi petas al tiu, ke bonvolu prezenti ilin al mi!

(dankon!)

fabelo

Gruo kaj krabo (2)

originalo de Akita Uzyaku, tradukita de Sibayama Zyun'iti

Noto: Akita Uzyaku (1883-1962) estas japana novelisto, fabelisto kaj esperantisto.

秋田雨雀原作「つるとかに」、柴山純一訳

La juna fiŝo ne povis respondi al tiu maljunula demando, kaj nur palpebrumadis. Tiam angilo eliĝis el ŝlimo, kaj ŝajne mokante ĉiujn, diris: “De malnova tempo, oni diras ke malsaĝaj fiŝoj surteriĝas. En tia ĉi varma tempo, unu minuto da surterigo, ja faras nin mumiojn. Prefere restu ene de ŝlimo, kiel mi, estas plej bone.”

Kaj la angilo denove eniris en la ŝlimon. La angilo estas egoisma kaj ĉiam malŝatata de aliaj, sed ĉi-okaze, aliaj fiŝoj ne povis refuti tian diron de la angilo, kaj restis mutaj. Longe daŭris konsiliĝado, sed la plej grava punkto, kiel eliri de la lageto, haltigis ĉiun diskuton.

Ĝuste tiam, iu alparolis el super la lageto. Ĉiuj fiŝoj suprenrigardis al tiu direkto. Estis gruo. Malgraŭ la sekiĝo, la gruo havis ŝikan veston kaj staris sur la bordo de la lago per du longaj kruroj.

“Karaj fiŝoj, kion vi faras en tia ĉi malgranda marĉo en la tempo de sekiĝo? Baldaŭ vi mortos sekigite. Prefere vi iru al akvo plena lago kaj faru senĝenan vivon tie!”

Tiel la gruo alparolis kun digna tono.

Maljuna fiŝo tre ĝentile respondis: “Jes, pri tio ni konsiliĝadas. Kiel ni povos eliri de ĉi tie al tiu lago? Favoru al ni saĝon, ni petas!”

Tiam la gruo, ridante diris en alta kaj akra tono: “Vi bezonas neniom da saĝo. Mi kun tiu ĉi beko kunprenos vin tien.”

Ĉiuj fiŝoj kaj fiŝidoj, aŭdinte tiun proponon, dance ĝojegis. Gepatroj kaj gefratoj perdintaj idojn, imagis al si la malfeliĉajn fiŝojn, kiuj povus esti savitaj kune. Tro hastemaj fiŝoj eĉ jam ekmarŝis antaŭen al la gruo.

“Atendu momenton!” haltigis aĝula fiŝo, kaj alparolis:

“Kara gruo, pardonu min dubi pri vi, sed ĝuste kiel pruvo, prenu unu el ni, montru al ĝi la lagon, kaj reprenu ĝin ĉi tien. Tiam ni ja volonte lasos vin preni nin ĉiujn.”

“Tre volonte!” respondis la gruo.

Do ĉiuj fiŝoj konsiliĝis, kaj karmo elektiĝis

kiel viktimo de tiu ĉi aventuro. La gruo tuj prenis la karpon en sian bekon, alten ekflugis, ĉirkaŭflugis super la bela lago malrapide, kaj reprenis ĝin al la antaŭa lageto. La fiŝoj estis tute trankvilaj pro tio, kaj decidis, ke la gruo prenu fiŝon sur sia beko unu post la alia celante la lagon.

La gruo fluge portis po unu fiŝo, kaj ĉiun voris bongustege sur arbo nomata “vrana*”. En la paca lageto restis neniu fiŝo. Nur lasita tie estis krabo.

La gruo alparolis la krabon:

“Mi alportis ĉiun malfeliĉan fiŝon al la lago, do ankaŭ vi iru. Mi prenos vin kaj alportos tien.”

“Kiel vi alportos min?” – demandis la krabo.

“Mi portos vin en mia beko.” – respondis la gruo.

“Sed tiel mi eventuale falos, do mi ne petos vin alporti min.”

“Ne zorgu! Mi firme tenos vin en mian bekon, do trankviliĝu!” – diris la gruo.

Al la krabo tio ŝajnis malvera, ke la gruo alportis fiŝojn al la lageto. Sed se la krabo restus ĉi tie en la lageto, ĝi nur devus morti, kaj ĝi nepre volis iri al la lago. Se la gruo intencus manĝi la krabon, tiu ja pretas mortigi la grumon kontraŭe – tiel pensante la krabo alparolis la grumon:

“Estas malfacile al vi firme porti min. Kontraŭe, mi havas tiujn du pinĉilojn, kaj alkroĉos min firme al vi per ili.”

“Jes, tio taŭgas.” – respondis la gruo, tute ne konante la intencon de la krabo. Tiel la krabo alkroĉis sin al la kolo de la gruo per siaj du pinĉiloj. Ili flugis alten kvazaŭ aeroplano. La gruo montris la belan lagon al la fluganta krabo. Vere tute sube estis lago kun plene da akvo. La krabo tre volis tien alteriĝi eĉ minuton pli frue. Sed la gruo tute ne intencas suben iri al la lago.

“Nu, kamarado gruo, la lago estas tute sube.

Sed kien vi celas?” – la krabo maltrankvile demandis.

“Hm, vi nomas min kamarado! Mi ne estas cia servisto. Kiu nur sekvados cin! Nu, vidu, kio tie estas videbla? Ili estas la ostoj de fiŝoj, kiujn mi formanĝis. Ĉiuj malsaĝaj fiŝoj fariĝis miaj manĝaĵoj. Jen estas cia vico!”

Tiel diris la gruo. Ja la krabo trovis, ke sub la arbo “vrana” amasiĝis monto da fiŝkadavroj.

“Ho, kompatinde! Vi celis feliĉon tamen iĝis manĝaĵoj de tiu ĉi gruo. Nu mi venĝos vin fiŝojn” – tiel pensante en koro, la krabo alparolis la grumon:

“Bedaŭrinde, mortigota ne estas mi, sed ci. Ambaŭ pinĉiloj miaj ĉirkaŭas cian kolon. Mortante, ni du samtempe devas morti. Mi fortontos cian kolon per la pinĉiloj, kaj vi tuj mortos.”

Tiel la krabo preskaŭ alpinĉis la gruan kolon. La gruo, sufokate kaj dolorigate, petis kun larmoj:

“Volu pardoni min. Mi neniam voros vin.” – tiel la gruo petis, faldigante siajn flugilojn.

“Nu, ja mi lasos vin viva, do albordiĝu al la lago.” – la krabo ordonegis la grumon.

La gruo flugis malalten kaj malalten, por meti la krabon borde de la lago. Kaj kiam la gruo albordiĝis al la lago, la krabo tute trafis la gruan kolon per ambaŭ pinĉiloj kaj fortranĉis ĝin.

La krabo eniris en la profunde verdan akvon, longe sopiritan. (fino)

《de la tradukinto》 Mi ne povis trovi kio estas la arbo ヱラナ .

Bildo de dinosaŭrino

Miyazaki Hideko

Mi faris kupran presaĵon de dinosaŭrino ludanta ukulelon. Ankaŭ mi ludas ukulelon, do mi pensis ke estus amuze se dinosaŭrino ludus ĝin.

Ĉi tiu bildo estis ekspoziciita ĉe *Yoshino-cho Simin Plaza*, Jokohamo dum julio. En aŭgusto, mi ekspozicios alian bildon. Bonvolu rigardi ĝin.



sezonvorto aŭgusta

Akvomelono

Okita Kazumi

Ĝi estas unu el la reprezentaj fruktoj sciigantaj al ni alvenon de somero. Onidire zenisto INGEN enportis ĝin en Japanion el Ĉinio dum la mezo de la 17-a jarcento (en la Edo-epoko), sed tio ne estas certa. Ĝia efektiva kultivado en Japanio komenciĝis post la lastaj jaroj de la erao Meiji (1868 ~ 1912).

Oni nomas ĝin “Water melon” en la angla, kaj do estas ideala manĝeto de somero, ĉar ĝi enhavas grandan kvanton da vitaminoj kaj mineraloj kiel karoteno kaj kalio.

Oni rekomendas malvarmigi ĝin per malvarma akvo kaj manĝi ĝin laŭeble frue post malvarmigo, ĉar ĝia dolĉeco multiĝas pro malvarmigo.

